

# POLIA ESPERANTISTO

2 • marto-aprilo • 1971

Zł 6.—



*La Reĝa Kastelo en Varsovio estas rekonstruota laŭ la stato en la jaro 1939*

Jerzy Uśpieński

## LA KASTELO DE NIA FIERO

La lastatempa decido de la nova politika gvidantaro de Pollando rekonstrui la Varsovian Reĝan Kastelon elvokis grandan tutnacian entuziasmon. La Civitana Rekonstrua Komitato, fondita antaŭ kelkaj semajnoj, jam ricevis en sian konton de kelkaj milionoj da zlotoj dank' al libervolaj enpagoj fare de diversaj organizaĵoj kaj unuopuloj. Portas sian modestan groŝon emeritoj kaj invalidoj, diversaj kaj diversrangaj specialistoj deklaras senpagan helpon ĉe la rekonstruaj laboroj. Ekzemple du elstaraj horloĝistoj deklaris senpagan rekonstruon de la horloĝo en la kastela turo. Aliaj metiistoj deklaris senpagan faron de plankoj aŭ de ornamaĵoj, kaj tiel plu kaj tiel plu.

Kaj ĉio ĉi okazas ja en la momento, kiam montriĝis,

ke la lando troviĝas en nefacila ekonomia situacio, kiam oni klare malkaŝas, ke la vivnivelo de sufiĉe granda parto de la socio estas nekontentiga.

Kial do en tia situacio oni decidas rekonstrui la iaman reĝan kastelon? Des pli — en socialisma lando? En la momento, kiam necesas ĉiujn fortojn kaj rimedojn koncentri por esence gravaj ekonomiaj problemoj? Tiajn kaj similajn demandojn certe starigas al si ankaŭ multaj niaj legantoj.

Do, ni volas doni almenaŭ kelkajn elementojn por la respondo al tiuj ĉi demandoj.

Unue — necesas memori, ke Pollando, post diversaj, sed ja ofte brilaj sortoj de sia malnova historio,

*daŭrigo sur la p. 8, 9*

## EN DENSA MALLUMO BRILETAS LA CELO...

„En densa mallumo briletas la celo, al kiu kuraĝe ni iras...” — ĉi tiuj vortoj de Ludoviko Zamenhof venis en mian kapon, kiam mi legis antaŭ nelonge felietonon en la pola satira semajnevuo „Szpilki” (Pingloj), kies aŭtoro senkompate primokis kaj la kreinton de la internacia lingvo kaj Esperanton mem. Mi imagas vian ŝokon.

Tamen. La fakto, ke tia artikolo povis aperi en pola gazeto, en la lando, kie ne pasas eĉ unu tago sen artikolo, informo aŭ sciigo pri atingajoj de la pollanda esperantista movado aŭ aktivecoj de eksterlandaj esperantistoj, kie la aŭtoritatoj subtenas la movadon — kaj morale, kaj finance, en la lando, kies ĉefa radiostacio emisias dufoje tage duonhoran Esperanto-programon — tia fakto devas pensigi nin, esperantistojn.

El la miksaĵo de la stultaj konstatoj, eĉ klaĉoj, el ekzemploj de kompleta ignoranteco — mi elektis unu konstaton de Jerzy Urban, la aŭtoro de la menciita felietono, pro kiu eble li skribis la tutan felietonon. Tiu ĉi konstato estas jena — mi citas:

„Ili (la esperantistoj) ŝajnegas, ke iliaj ideoj estas grandaj, la alvoko grava, la agado utila socie”.

Ĉu ni ŝajnegas?

Konsiderante, ke la bona rajto de ĉiu ajn satira gazeto estas moki — ni ne povas konsenti, ke estas ĝia rajto sciigi falsajojn.

Ĉu tamen kulpas nur Jerzy Urban? Eble tamen ne nur...

La citatan frazon sekvas la jena:

„Ili (la esperantistoj) ne scipovas nur diri senhave — kial, kvankam ili silente agnoskas, ke Esperanto estas sen ŝancoj”.

Ĉu ni ne scipovas diri? Ĉu ni silente agnoskas?

La falsaj imagoj de Jerzy Urban ne preniĝis el la ĉielo. Simple, ni, esperantistoj, estas tro silentemaj.

De kie la ordinara homo povas scii, kiom multe esperantistoj helpis unuj al aliaj, aŭ — kompreneble — ankaŭ al neesperantistoj en la jaroj de la unua kaj dua mondmilitoj, mem aŭ pere de la Internacia Ruĝa Kruco? Ĉu la ideo de helpado al la kruele subpremataj nacioj ne estas granda ideo de la esperantistoj, pri kies manko riproĉas nin la felietonisto?

Ĉu kaj de kie la ordinara homo povas scii, kiom helpis kaj helpas al la heroaj vjetnamanoj ĝuste tutmondaj esperantistoj? Ĉu la solidareco kun la brava kaj martira nacio ne estas granda ideo?

Ĉu scias la ordinara homo, kiomgrade esperanti-

stoj aktivigas en la landaj kaj tutmonda pacmovadoj? Ĉu batalado por paco en la tuta mondo ne estas granda ideo?

Starigante ĉi tiujn retorikajn demandojn mi ne volas stimuli vin al partopreno en ĉiuj ĉi agadoj. Ja mi scias, ke vi ĉiuj — laŭ via eblo — rekte aŭ nerekte partoprenas tiujn ĉi tutlandajn kaj tutmondajn kampanjojn.

Ni tamen, kion mi plurfoje kaj ĉe diversaj okazoj skribis en miaj felietonoj, tro faras ĉi tion „sur la propra korto”, tro malmulte ni aktivigas sur aliaj kampoj — ĝuste kiel esperantistoj kaj ne hezitante akcenti, kiam ni plenumas gravajn sociajn laborojn, ke ni estas esperantistoj.

La prezidento de Aŭstrujo, d-ro Franz Jonas, ne hezitis persone elpaŝi dum la pasintjara Universala Kongreso de Esperanto en Vieno kaj fari paroladon en la internacia lingvo. Li ne timis „riski” la prestiĝon de ŝtatkapo. Ja li sciis, ke ne temas pri iu ajn risko. La internacia lingvo estas afero agnoskita kaj ne plu oni devas ĝin trakti en la lingvaj kategorioj. Oni devas ĝin trakti ĝuste en la kategorioj de la socia utileco. La felietonisto, malhavanta iun ajn imagon pri tio, kio estas Esperanto, intuicie sufloris al ni aferon de ni multaj ne konsciatan. Per sia atako li faris al ni ankaŭ bonan servon. Laŭ la pola proverbo — kiaj oni vidas nin, tiaj oni priskribas nin — ni kaŭzu, ke ni estu alie vidataj. Tre prudente d-ro Franz Jonas akcentis en sia parolado, ke ni ne atendu registarajn, desuprajn decidojn favore al Esperanto. Li diris, ke ni prefere kaŭzu, ke la registaroj estu kvazaŭ devigitaj esti favoraj al la internacia lingvo, ke la registaraj decidoj estu kvazaŭ aŭtomate favoraj al Esperanto.

Kaj kiamaniere ni povas kaŭzi tion, se ne ĝuste per diversaj utilaj agadoj sociaj? Ili estu tiaskalaj, ke neniu povu pridubi ilin. Ili estu tiel valoraj, ke ĉiu devu rekoni ilin. Ili simple estu konformaj al tio, kion de la esperantistoj atendis la kreinto de la internacia lingvo, Ludoviko Zamenhof, ili favoru pacon, amikecon kaj kunlaboron de la nacioj. Neniu ignora felietonisto povos tiam skribi similan felietonon al tiu, kiun mi ĵus citis, ĉar neniu felietonisto estos tiam ignora pri Esperanto.

Kaj tio ĉi, mi firme kredas, estos la plej bona omaĝo por Ludoviko Zamenhof, kies 111 datrevenon naskiĝan solenis antaŭ nelonge la homoj de bona volo — la esperantistoj.

---

### Elkore invitas vin

la 3 Teritoria Komitato de la Hungara Esperanto-Asocio kaj la Baranya Departementa Naturamika Asocio  
por la 4 Internacia Renkontiĝo Naturamika (4 IREN)  
okazonta en Abaliget, Hungario, de la 17 ĝis la 27 de julio 1971.  
En la kadro de IREN ni aranĝos perpiedajn kaj aŭtobusajn ekskursojn.  
Okazos krome lumbild-film- kaj aliaj prezentadoj, amuziĝoj, kpt.

# La tempo de ŝanĝoj



EDWARD GIEREK — La I sekretario de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio

Paroli pri la hodiaŭa tago en Pollando signifas ankaŭ paroli pri la tragikaj eventoj en nia marborda regiono en decembro de la pasinta jaro. Ja ĝuste tie, en kelkaj tiel gravaj urboj, kiel Gdańsk aŭ Szczecin — okazis elpaŝoj de laborista klaso, okazis laborista protesto. En la surstrataj tumultoj pereis kelkdek homoj, multaj centoj da homoj estis vunditaj.

Tiuj ĉi eventoj, kiuj per tragika ombro metiĝis sur nian realon — longe dividis nian nuntempon je tio, kio estis antaŭe, je tio, kio estis poste, estas nun kaj estos en la estonto.

Per kio estis kaŭzitaj tiuj ĉi eventoj, kiuj rezultigis la profundan krizon en nia ŝtato, minacintan per neantaŭvideblaj konsekvencoj?

La krizo estis kaŭzita same de eraraj ekonomiaj konceptoj, ekonomia praktiko, kiel ankaŭ de grava rompo de la principoj de la socialisma demokratio fare de la antaŭa gvidantaro de la partio kaj registaro. Tio ĉi, kompreneble, alkondukis ankaŭ al krizo de konfido inter la tiama gvidantaro de la partio kaj registaro kaj la laborista klaso, laborantaj amasoj kaj tuta socio.

Kiel estas ĝenerale konate, la renovigo (al tiu ĉi vorto mi ankoraŭ revenos) en Pollando venis kune kun la VII Plenkunsido de la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio (20.XII.1970), kiu faris fundamentajn ŝanĝojn personajn en la ĉefaj instancoj de la partio kaj indikis la vojon de eliro el la krizo kaj el la politika kaj ekonomia marasmo. Fundamentajn ŝanĝojn personajn faris ankaŭ la pola parlamento — Sejmo de Pola Popola Respubliko — en la Sejmo mem, en la Ŝtat-Konsilantaro kaj Registaro.

La VII Plenkunsido de la CK de PULP faris principan turnon en la vivo de nia lando. Mi permesas al mi citi ĉi-rilate vortojn de la nova I sekretario de la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio, Edward Gierek:

„Hodiaŭ ni povas konstati, ke tiam, en decembro, la VII Plenkunsido sukcesis plenumi la postulojn de la momento. Eble malfrue, sed ja ankoraŭ ne tro malfrue nia partio trovis en si sufiĉe da braveco por ekrigardi en la okulojn de la realo kaj sufiĉe da forto por direkti la landon sur la vojon de eliro el la krizo. Grandega plimulto de la laborista klaso, laborhomoj, montris sufiĉe da civitana respondeco, politika prudento kaj socia disciplino, por ke tiu eliro fariĝu ebla”.

Mi supre uzis la vorton: „renovigo”. Tiu ĉi nocio aperas ofte en nia lando por determino de la procezo de la ŝanĝoj ĉe ni. La vorto „procezo” estas ĉi-koncerne plej eble adekvata al la ŝanĝiganta socia realo.

Oni do faras en nia lando korekton de la ekonomiaj kaj sociaj premisoj, kiuj en pluraj lokoj pasis preter la antaŭe anoncataj politikaj tezoj kaj programo de la disvolvado de la lando, pro kio ĝuste kreiĝadis la sociaj tensioj. Hodiaŭ do temas pri tio, ke la vortoj plene egalsignifu la agojn, ke ili plene gravu socie kaj ke ili estu socie plene validaj. La fenomeno de tia akordeco de la vortoj kaj agoj estis inaŭgurita de la priparolata nun VII Plenkunsido de la CK de PULP.

Laŭ la teoria vidpunkto, la nunan periodon oni povas nomi: rompo kun memvolismo, rompo kun la praktiko de alprenado de gravaj ŝtataj decidoj en malnombra aro, ofte aparte de la politika kaj socia realo, aparte de la socio kaj laborista klaso.

La fundamentaj, tutsocialismaj principoj kompreneble restas la samaj. Sed, kiel multe oni povas ŝanĝi, ŝanĝante jam la sintenon mem je sinteno honesta, je agado honesta, realeca, celanta se eble plej vastan socian utilon.

Tiun ĉi honestecon ni renkontas hodiaŭ de ambaŭ flankoj: ĉe la gvidantaro de la partio kaj registaro kaj ĉe la laborantaj amasoj, ĉe la laborista klaso. La laborantaroj, la anaroj de fabrikoj, entreprenoj — respondas al tiu ĉi pozitiva agado de la nova gvidantaro de la partio kaj registaro per pligrandigitaj produktaj agoj; la gvidantaro de la partio kaj registaro kun miriga rapideco entreprenas streĉojn kaj praktikajn paŝojn, por iri per plej larĝa fronto la pravan vojon de la regulkonformaj agadoj.

Tian pruvon pri agado donis la nuna gvidantaro de la partio kaj registaro, nuliginte, kiam tio ĉi fariĝis ebla, la decembran plialtigon de la prezoj de la viandartikloj kaj aliaj nutrajaj artikloj, nuliginte ĉi tiun plialtigon, kiu ja estis la ĉefa kaŭzo de la laborista protesto en la marborda regiono kaj la ĉefa kaŭzo de la socia malkontento en nia lando.

Ĉe tia sinteno devas foriradi kaj foriras en la pasinteco la senanima administrado, la agado de trans la skribotablo; ilian lokon prenas krea laboro, aktiva gvidado kaj regado de la lando — surbaze de prudenta socia agado kaj krea sinteno.

Ni do estas atestantoj de la konstante progresanta procezo de la ĉiuflanka sanigado de nia socialisma demokratio, ĝusta formado de la rilatoj de la partio kaj registaro kun la laborista klaso, kun la tuta socio. Estas restarigataj la komunaj ligoj, bazitaj sur ambaŭflanka konfido.

La periodo, kiun ni nune priparolas, estas do periodo de la forigado de multaj nenormalaĵoj el nia vivo. Estu do al ni permesite menciigi ĉi-rilate kelkajn direktajn ekzemplojn, atestantaj pri la larĝa fronto de la nova agado:

Tio ĉi estas: levado de la plej malaltaj enspezoj, pensioj, emerituloj kaj porfamiliaj monalpagoj (por

parta nuligo de la farita plialtigo de la prezoj de la nutraj artikloj), la pli posta forigo (en la mezo de februaro) de tiu ĉi plialtigo de la prezoj (kun samtempa daŭrigo de la valideco de la malaltigo de la prezoj de multaj industriaj artikloj, daŭrigo de la valideco de la plialtigo de la supre menciitaj malaltaj salajroj, pensioj, emerituroj kaj porfamiliaj monalpagoj), decido pri ne plialtigado de la prezoj de la nutraj artikloj dum almenaŭ du jaroj, decidoj pri la sezonaj malaltigoj de prezoj, anoncita batalo kontraŭ kaŝajn plialtigojn de la prezoj sur la merkato, premo je malplikostigado de la artikloj de la industria deveno, sistema pligrandigado de la loĝejkonstruado, solvado de neglektitaj socialaj aferoj en la laborentreprenoj, postulo, ke la sindikatoj plenumadu la ĝustan rolon, kaj tiel plu, kaj tiel plu.

Mi menciis tiom da ekzemploj, kaj ja tio ĉi estas nur parto de tiu ĉi grandega fronto de la mastra ordigado de la aferoj de nia lando.

Ĉio ĉi estas paŝoj kaj entreprenoj celantaj same portempajn, kiel ankaŭ longdistancajn agadojn de la ŝtataj organoj (kun plej eble vasta kunpartopreno kaj helpo de la tuta socio) favore al konstanta kaj sistema, sentebla por ĉiuj plialtigado de la vivnivelo de nia nacio.

Tio, kion ni supre indikis, estas nun la ĉefa fluo de la socia vivo en Pollando. Tiu ĉi direkto de la agado trovas socian aprobon, trovas komprenon ĉe la laborista klaso, ĉe la tuta socio. Tiu ĉi aprobo havas decidan signifon.

Kiel vi vidas, tio ĉi celas ŝanĝon de la interna politiko de la lando, kontraŭe al la eksterlanda politiko de nia lando, kiu restas sen ŝanĝoj, ĉar ĝi estas agnoskata ĝenerale — same en la lando, kiel ankaŭ eksterlande — prava kaj regulkonforma.

Mi opinias, ke en tiu ĉi loko oni devas starigi al si la demandon, kiaj estas garantioj, ke tiaspecaj kripligoj, ke tiaspecaj eventoj neniam plu okazu en nia lando.

Tia garantio estas ĉefe obeado al la socialisma demokratio kaj popola leĝeco. Plia fundamenta garantio estas la jam emkondukita ĉe ni sistemo de konsultado kun la socio fare de la plej superaj partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj antaŭ alprenado de decidoj rilate gravajn ŝtatajn aferojn. Tia garantio estas la korektado de la politiko per la ĵus menciita konsultado. Plie, tia garantio estas realeca politiko, realeca vizado de la politikaj kaj sociaj aferoj, estas apelaciado, la kapabloj apelacii al la saĝo, al la politika kaj socia prudento de la nacio, apelaciado pri aktiveco, oferejo kaj amo de la nacio al la patrujo.

Ĉar la nacio estas bona, plej bona barometro.

De la partia kaj registara gvidantaro oni postulas de la kapablon uzi tiun ĉi barometron kaj oni postulas, ke la gvidantaro eltiru la konformajn konkludojn.

Ĉar, ĉu ne obsedis nin en Pollando de kelkaj jaroj la ĉiam pli firmiĝanta konvinko, ke la politika kaj ekonomia gvidantaro de la lando ne plene elprofitas ĉi tiun nian aktivecon, ĉiujn niajn virtualajn eblojn enstantajn en niaj homaj provizoj, en la ekonomiaj kaj naturaj provizoj. Ĉio ĉi kondukis al la malpliboniĝado de la ekonomia situacio de la ŝtato, kion ni profunde sentis kiel staton nemerititan kaj nekulpitan.

Kaj nia lando ja disponas multajn eblojn homajn, multajn talentojn, kapablojn, energion, mineralajn provizojn. Aliaj landoj, kiuj ne disponas tiajn provizojn, atingis kaj atingas pli bonajn rezultojn kaj pli altan vivnivelon.

Nia tragedio estis tio, ke la eksa gvidantaro de la partio kaj registaro mem kaŭzis tiujn ĉi stumblojn — kiel do ĝi povis uzi ĉi tiun barometron, la nacion...

En tiu ĉi loko — mi skribu ĉi tion — mi proponas ne fali en troigon. Mi samtempe volus apelacii al tiuj el vi, kiuj en la lastaj jaroj vizitis nian landon. Tiuj el vi scias bone, kiom ni faris en nia lando — iam tiel regresa kaj tiel kruele damaĝita kaj detruita de la II mondmilito. Kiom multe ni atingis.

Temas tamen pri tio, kiel oni elprofitas ĉi tiujn niajn provizojn, temas pri tio, ĉu la socia laborstreĉo estas plene elprofitata, ĉu ĝi ne estas malŝparata per malkapablo kaj malkompetenteco.

Kaj jen ni venas al la kerno de la afero: en Pollando en akra maniero manifestiĝis la malkontento, precipe de la laborista klaso, pri la ekonomia kaj socia situacio de la lando. Tio estis akra protesto, sed protesto ne direktita kontraŭ socialismon. La eliron trovis la partio kaj ĝi solvis la konflikton en la propra kadro, en la kadro de nia socialisma socia sistemo.

Ni scias, ke per tia solvo kaj tia eliro el la krizo (per tio, ke la solvon ni trovis en la kadro de nia socia sistemo) ni ĉagrenis kelkiujn malamikajn al ni centrojn kaj mediojn okcidentajn, inkluzive multajn gazetojn kaj aliajn rimedojn de la amaskomunikado. Sed jam tia estas la naturo de la politika kaj socia agado, ke ne eblas kontentigi ĉiujn. Tial do ni lasu ilin en la propra „saŭco”.

Sed Okcidento ja ne ĉiuloke samsignifas. Ĝuste ankaŭ en Okcidento multaj altranguloj kaj multaj politikaj komentistoj ktp. scipovis rimarki en la veraj dimensioj same tion, kio okazis en Pollando, kiel ankaŭ precipe tion, kion oni hodiaŭ faras en Pollando (parenteze dirite, la nuna gvidantaro de la partio kaj registaro estas agnoskita kiel la plej laborabsorbata en la tuta Eŭropo).

\*

Ni dume eklaboris kun nova spirito. Ni laboras kun des pli granda emo, ĉar la nun indikitaj direktoj de la ekonomia-socia evoluo estas mobilizaj, stimulaĵaj, kaj samtempe realecaj. Tio ĉi ne estas vizioj sen konfirmo.

Kaj tiu ĉi fakto ankaŭ estas tre grava. Hodiaŭ, en niaj konkretaj kondiĉoj, facile eldiratoj vortoj, vortoj sen konfirmo nemulte signifus. Se okazis la normaligo en nia lando kaj se ĝi sekvis relative rapide — tiel okazis ĝuste dank’ al tio, ke la vortoj socie kaj politike validaj trovas konfirmon en la praktiko, en la socia kaj politika agado.

Tian sintenon, tian politikan kaj ekonomian honestecon de la partia kaj registara gvidantaro la tuta pola socio delonge atendis kaj daŭre atendas, kaj tute certe ĝi pravos ĉi-rilate.

Mi opinias, ke plimulto de nia socio jam ricevis la satisfakcion, kiun dece estus, ke ĝi ĉiam havu. Sed samtempe plimulto de nia socio scias ankaŭ tion ke tuj oni ne povas atingi ĉion. Tial do, kiu estas prudenta en nia lando, tiu ne atendas rapidan plibonigon de ĉio, precipe de la ekonomia situacio, de la vivkondiĉoj de la plej vastaj amasoj de la laboruloj.

Ni scias, ke al tio ĉi oni devas venadi iompostiom, ni vidas, ke jam multon ni atingis, sed ankaŭ, ke oni devas ankoraŭ multon plibonigi, refari. Temas tamen pri plibonigado videbla, sentebla por ĉiuj. Temas pri vizado kaj sentado de tiu ĉi perspektivo kaj de tia estonteco de nia lando.

Mi estas konvinkita, ke tio ĉi estas al ni donita kaj ke ĉio estas en niaj manoj, en niaj mensoj kaj en niaj koroj.

JAN KLIMEK

---

## VII INTERNACIA ESPERANTISTA FERIADO „Ora Pola Aŭtuno”

17—30.X.1971 — Międzygórze — Pollando

De la 17 ĝis la 30 de septembro 1971, en la pitoreska montara ripozloko Międzygórze okazos la VII Internacia Esperantista Feriado „Ora Pola Aŭtuno”. La Feriadon organizas la Feria Fako de la Polaj Sindikatoj kaj la Vroclava Filio de la Pola Esperanto-Asocio. (Wrocław — 17, Poŝtkesto 16, Dubois 3, Pollando, konto: PKO Wrocław 3-9-113).



## LECH KOSIENIAK

Prezidanto de la Ĉefa Estraro  
de la Pola Esperanto-Asocio

# Ĉu ni jam estas kontentaj?

Pasis jam pli ol 2 jaroj de post la lasta Tutpolanda Kunveno de Delegitoj de la Pola Esperanto-Asocio, okazinta la 16 de junio en la 1968 jaro. Estas do jam urĝa tempo skizi kelkajn informojn pri la realigo de la taskoj, kiujn la delegitaro starigis tiam antaŭ la novelektita Ĉefa Estraro de PEA kaj antaŭ la tuta membraro de nia asocio. La nuna tempo estas des pli taŭga por fari tion, ĉar ni antaŭvidas okazigon de Tutpollanda Kunveno de Delegitoj en aŭtuno de la nuna jaro. Ni povos do serioze pridiskuti la ĉefajn problemojn kaj bone prepari nin al tiu ĉi kunveno.

La plej grava demando, kiun ni devas starigi antaŭ ni — antaŭ la funkciuloj, aktivuloj kaj vicaj membroj, estas jena: ĉu nia organizaĵo kaj nia statuta laboro signifas progreson de la pola esperantista movado aŭ ne? Ĉu ni montriĝis esti kapablaj realigi niajn komunajn celojn kaj taskojn?

En relative mallonga artikolo oni ne povas plene amplekse respondi al tiuj ĉi demandoj. Ni provu tamen skizi kelkajn fundamentajn atingaĵojn en la pasinta periodo, ne kaŝante niajn multflankajn malfacilaĵojn, kaj eĉ kulpojn, kaj ĉiu el nia membraro mem povos respondi al si je la starigitaj demandoj.

Nian atenton ni intencas koncentri al tio, kio laŭ nia opinio estis kaj estos la plej grava por plua kaj sukcesa evoluo de la esperantista movado en Pola Popola Respubliko.

La vicprezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA, s-ano Marian Kostecki, tute prave skribis en sia artikolo „Ĉu nia nova tasko signifas progreson de la pola Esperanto-movado?” („Pola Esperantisto”, n-ro 1/1970):

*„La 16-an de junio 1968 oni malfermis tute novan ĉapitron en la vivo de nia esperantista movado. Ĝia fina sukceso dependas tamen nur de la tutlanda esperantistaro mem. Nenion faros la funkciuloj, aktivuloj mem, ofte solece agantaj, kiuj ne ĉiam povas aŭ kapablas kunlabori kaj kunvivi konkorde kun la loka esperantistaro, ŝtataj instancoj, aliaj sociaj organizaĵoj ktp. Ekzistas ja tute malnova vero, ke ĉiun socian gvidanton — ankaŭ en nia movado — devas akompani la tuta membraro, por ke niaj gvidantoj ne sentu sin perdiĝintaj, forlasitaj en sia propra medio.”*

Absolute prava rimarko. Ĉu tamen fakte dum la lasta periodo estis ĉio farita por subteni tiun ĉi evidentan veron? Laŭ mia opinio ne ĉiam kaj ne ĉie, kaj la kulpo estas ambaŭflanka. Ĉu la streboj de la Ĉefa Estraro ordigi la aferon de la statuto kaj la organizon de PEA ĉiam havis la ĝustan reeĥon en la lokaj filioj kaj ĉe la unuopaj membroj? Sufiĉas rememorigi la evidente ne plej intiman kunlaboron inter niaj instancoj kaj la tuta membraro.

Ekzistas tamen kelkaj tute nediskuteblaj atingaĵoj en la pasinta periodo, pri kiuj mi skribu kelkajn vortojn.

La plej fundamenta atingiĝo de nia asocio en la pasinta periodo estas la klara distanciĝo disde la t.n. esperantista neŭtralismo, komprenata kiel kompleta izoliĝo disde la aferoj, al kiuj — kiel civitanoj de la difinita ŝtato kaj nacio — ni devus servi unuavice, entirante en ilin ankaŭ nian laboron sur la kampo de la esperantista ideo — la ideo de la internacia lingvo kiel instrumento kontribuanta antaŭ ĉio al popularigo de la atingiĝoj de nia socialisma ŝtato, al interproksimiĝo de la nacioj kaj al internacia kunlaboro, al ĉiam, kaj tutspeciala hodiaŭ aktuala, aktiva batalo por paco kaj socia justeco en la tuta mondo. Jen la kaŭzo de nia konsekventa aktiviĝo en la soci-politika vivo de nia lando, aktiva partopreno — ĝuste kiel esperantistoj — en multaj agadoj servantaj al la evoluo kaj firmiĝado de la prestiĝo de nia ŝtato sur la internacia areno. Estas malfacile menciigi ĉiujn niajn ĉikoncernajn iniciatojn.

Ni rememorigu tamen mallonge, ke la mezuro de la formiĝado de la ĉiam pli decida soci-politika aktiveco de nia asocio estis nia agado en la periodo de la balotoj por la Sejmo kaj por la Naciaj Konsilantaroj en la 1969 jaro, la datrevenoj de la Oktobra Revolucio, la V Kongreso de la Pola Unuiginta Laborista Partio, la Jardudekkvino de Pola Popola Respubliko, la Jaro de Lenin, la Unuamajaj Festoj, la solenaĵoj de la 25 datreveno de la venko de la aliancaj fortoj super faŝismo, la datrevenoj de la liberigo de Oświęcim kaj pluraj aliaj.

Ĉe la okazo de tiuj ĉi datrevenoj kaj solenadoj ni faris plurajn agadojn, esprimiĝintajn en la organizo de konformaj kunvenoj, diskutoj, sendado kaj aperigado de konformaj artikoloj en la gazetaro, informoj, cirkulleteroj kaj alvokoj al niaj membroj, ktp.

Oni devas konstati, ke tiaspeca agado de nia asocio renkontis la ĝustan reeĥon ĉe la lokaj esperantistaj organizaĵoj, kaj ankaŭ ĉe unuopaj membroj, kiuj plurfoje anticipis eĉ niajn kampanjojn kaj iniciatojn. Tio ĉi estas fenomeno treege pozitiva, distinganta nian asocion per la konformaj rango kaj signifo. Tiun ĉi specon de nia agado ni devus plue disvolvadi, intensigadi kaj firmigadi.

Se ni jam estas ĉe tiuj ĉi aferoj, ni tuŝu ankaŭ esencajn problemojn, kiuj koncernas nian rilaton kaj rolon antaŭ la esperantista eksterlando.

Ni klare vidas nian rolon kiel portanton (transportanton rilate al la multmilionaj esperantistaj amasoj) — de la polaj valoroj politikaj, sociaj kaj scienc-kulturaj. En tio ĉi enestas nia plej granda ŝanco kaj la senco de la ekzistado. Alie dirite: Pola Esperanto-Asocio tiom havas sencon, se kaj kiom ĝi transportas la polajn valorojn rilate al la esperantistoj dissemataj tra ĉiuj kontinentoj. Tiuj ĉi esperantistoj estas nia plej granda kapitalo, ĝustadire ĝis nun en la organize planita senco ne elprofitita sufiĉe.

Nun ni ĉiuj devas en grado multe pli granda ol ĝis nun plivastigi nian agadon direktitan al eksterlando, ni devas pli profiti el la kulturaj atingiĝoj de nia lando kaj transdonadi ilin al la eksterlandaj esperantistoj. Hodiaŭ estas al ni tiom pli facile fari ĉi tion, ĉar elkreskis ĉe ni aro da memstaraj kreantoj, tradukistoj kaj plenumantoj esperantistaj.

Ni ne pentrus ĉi tie la plenan bildon, se ni ne akcentus la grandegan rolon de la Esperanto-disaŭ-

digoj de la Pola Radio, kiuj disaŭdigoj sukcese ekzameniĝis laŭ la propaganda vidpunkto rilate la grandegajn amasojn de la eŭropaj esperantistoj, ĉar ĉefe al ili estas adresataj tiuj ĉi disaŭdigoj.

En la spirito de tio, kion mi ĵus diris — laboris kaj alprenadis starpunktojn la oficiala pola esperantista delegacio por la kongresoj en Helsinko kaj en Vieno. Raportojn pri nia laboro dum tiuj ĉi kongresoj ni aperigis en „Pola Esperantisto” (n-roj 4/1969 kaj 6/1970).

Parolante pri niaj rilatoj kun la esperantista eksterlando — ni ne povas preterlasi niajn tre bonajn rilatojn kun la esperantistaj organizaĵoj en la popoldemokratiaj landoj, kiel: Germana Demokratia Respubliko, Hungarujo, Bulgarujo kaj la amerikajn kontaktojn kun esperantistoj el Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio.

Tiujn ĉi kontaktojn ni plue vastigos, alkondukante en la estonto al duflankaj programaj interkonsentoj pri kunlaboro kun la frataj organizaĵoj esperantistaj en la popoldemokratiaj landoj.

En la sekva etapo, en la sekva plano — ni vidas eblojn ekligi kunlaboron kun elektitaj kapitalismaj landoj — unuavice kun tiaj, kiel: Finnlando, Svedujo aŭ Danlando.

\*

Nia dua grava atingiĝo, rezultanta el la antaŭe fiksitaj ideologiaj principoj de nia asocio — estis la pena kaj longa, sed kronita per sukceso, prilaboro de la nova Statuto de la Pola Esperanto-Asocio, aprobita la 30 de septembro en la 1970 jaro. La aprobo de la nova Statuto de PEA estas sendube nia asocia sukceso, ĉar la nova statuto donas al ni ne nur la eblon aliorganizi nian asocion, sed unuavice ĝi donas al ni novajn eblojn de agado.

Ĝi ligas nin, nian organizaĵon kun la administracia divido de la lando, kio forigas la ĝisnunan nenormalajn organizan, observitan laŭ la ekzemplo de la ekzistado de la regionoj.

Kun la esperantista organizaĵo ni iras nun profunden; ja ni havas nun la legalan eblon de kreado de rondoj.

Sume, la statuto distingiĝas per konformiĝo al la postuloj de la nuntempo de nia lando, kreas pli grandajn eblojn de demokrateco kaj memstareco de la tuta asocio, kiel ankaŭ de ĝiaj unuopaj ĉeneroj.

Ni deziras ĉeokaze atentigi vin, ke la novan statuton oni devas enkondukadi en la vivon kun granda elasteco — atente observante ĝiajn eventualajn neprecizaĵojn, por ke oni povu forigi ilin dum la proksimiĝanta Tutpollanda Kunveno de Delegitoj de PEA.

Lige kun tio ni aperigis plurajn detalajn instrukciojn, pliprecizigantaj la unuopajn formojn de la enkondukado de la statuto en la vivon kaj de la nova organiza strukturo rezultanta el la statuto. La instrukcioj estis anoncintaj kaj dissenditaj al la lokaj ĉeneroj.

Sendepende de tio ĉi, la membroj de la Prezidumo de la Ĉefa Estraro tenas senperajn kontaktojn kun lokaj organizaĵoj, gardante la regulkonformecon de la realigado de la proklamitaj instrukcioj. Tiu ĉi formo de la senperaj kontaktoj (tiel ambaŭflanke neglektitaj dum pluraj jaroj) montriĝas praktike nepriaksebla helpo en la klarigado kaj solvado de multaj malfacilaj kaj specifaj problemoj de la tiel nomata „tereno”, t. e. de la lokaj organizaĵoj de nia asocio.

\*

Kaj nun, mallonge, ekzemplaj informoj pri la direktoj de la statuta agado de la asocio. Ili estas klare difinitaj en la II ĉapitro de la Statuto de PEA.

Kion ni faris kaj kion ni faras tiurilate?

#### AFEROJ DE LA INSTRUADO

Ni atingis la aprobon de la „Rimarkoj pri la realigado de la programo de la instruado de la internacia lingvo Esperanto en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj” fare de la Ministerio por la Klerigo kaj Supera Edukado.

Ni kaŭzis la eldonon de la „Programo de la instruado” kune kun la „Rimarkoj” — en la formo de broŝuro (aperigis ĝin la Ŝtata Establo por la Lernejoj Eldonaĵoj laŭ komisiono de la Ministerio por la Klerigo kaj Supera Edukado) kaj ni eldonis la „Programon” kaj la „Rimarkojn” en Esperanto.

Ni finaligis la eldonon de la nova lernolibro de Esperanto s.t.: „Ĉu vi parolas esperante?”

Ni kunlaboris en la preparado kaj eldono de la mikrokanelaj sondiskoj por la lernado de Esperanto (la sonkompletigo de la lernolibro „Ĉu vi parolas esperante?”).

Ni plivastigis la korespondan instruadon kaj organizis branĉajn korespondajn kursojn (i.a. por la loĝantoj de la regionoj: Varmio, Mazurio, Grandpolujo).

Ni organizis vojevodiajn renkontojn de partoprenantoj de korespondaj kursoj, rezulte de kiuj kreiĝis aŭ kreiĝas novaj rondoj de PEA.

Ni prilaboris instruprogramojn de Esperanto por la lektoroj.

Ni organizis komune kun la Filio de PEA en Lodzo la X Tutpollandan Konferencon de Instruistoj de Esperanto, dediĉitan al problemoj de la edukado de la junularo pere de Esperanto kaj komune kun la Filio de PEA en Bydgoszcz la XI Konferencon de Instruistoj, pri kiu raporton ni aperigos en unu el la plej proksimaj numeroj de „Pola Esperantisto”.

Ni iniciatis ciklon de prelegoj en lernejoj, en kiuj estas gvidata la instruado de Esperanto kaj ni konstante informas la instruistojn pri aktualaj aferoj.

Ni elpaŝis kun la iniciato nomita: „Ni levas niajn kvalifikojn” (la lernojaroj 1970/71 estas dediĉita al plialtigado de la lingvaj kvalifikoj, lingvokono de la membroj de PEA).

Sisteme, ĉiun semajnon, estas ekspeditaj al la tuta ĉiutaga gazetaro kaj al la semajnevuo — unuopaj informoj aŭ informaj cirkuletoj. Estas iniciatataj intervjuoj pri Esperanto, oni enkondukis novajn konstantajn Esperanto-anguletojn en polaj gazetoj, i.a. en la monatrevo „Kormoran” (Kormorano). En la sfero de la informado oni sukcese utiligas la servojn de la Pola Pres-Agentejo (PAP), de la Pola Radio, de la Publicistika-Informa Agentejo (API). En la porgazetara informado oni ofte profitis specializajn temaron, direktante la fontmaterialojn al konformaj ĵurnaloj kaj revuoj. Valcras akcenti, ke pli vaste oni elprofitas la tute nombran gazetaron de la grandaj laborestabloj, gazetojn de laboristaj memgvidaj estraroj.

Ni ekligis kunlaboron kun ĵurnalistoj-esperantistoj en la redakcioj de kelkaj ĵurnaloj kaj revuoj regionaj (i. a. kun „Gazeta Olsztyńska” — „Gazeto de Osztyń”; „Nowiny Rzeszowskie” — „Novaĵoj de Rzeszów”), kio ebligis decidon intensigon de la informoj pri nia movado en unuopaj regionoj de la lando, kaj eĉ rezultigis la enkondukon de la konstanta ĉiusemajna Esperanto-rubriko en la tre populara semajnmagazino „Panorama Północy” (Panoramo de la Nordo).

Ni organizis tutpollandan kvizon s.t.: „Ĉu vi konas Esperanton?” — kun la partopreno de la redakcio de „Panorama Północy”.

#### EKSTERLANDA INFORMADO

Kunpartopreno en la pligrandigo de la programo de la Pola Radio en Esperanto.

La iniciato kaj kunpartopreno en la redaktado de la konstantaj Esperanto-anguletoj en la t.n. naciaj redakcioj de la Pola Radio — en la lingvoj dana, germana kaj sveda.

La enkonduko de la konstanta ĉiusemajna (ĉiudimanĉe je la 16.30 horo kaj ĉiulunde, ripetite, je la 6.00 horo laŭ MET) magazino dediĉita al problemoj de la esperantista movado, kun aparta konsidero al la pola esperantista movado.

La konstanta reklamado de polaj libroj en Esperanto (oni eldonis ekz. specialan informilon), kio ebligis konsiderindan malŝarĝon de nia staplo kun la malfacile vendeblaj eldonaĵoj. Kunlaboro kun la

centralo por la eksterlanda komerco „Ars Polona” ebligis vendon de eldonaĵoj al Sovetunio kaj popol-demokratiaj landoj (pere de la Centroj de la Pola Kulturo).

### ELDONAJ AFEROJ

Tio ĉi estas nia „aĥileza kalkano”, ĉar principe ni ne havas memstarajn eldonrajtojn (krom epitomoj kaj informaj materialoj, stencilite) kaj ni plue dependas de niaj propraj mendoj ĉe la ŝtataj eldonejoj (por kio mankas dume monrimedoj) aŭ *iniciitado* de unuopaj eldonaĵoj. Ja ĉiukaze ankaŭ en tiu ĉi sfero estas certaj, kvankam nia opinie tro moderaj atingiĝoj, ne konformaj al la kreskantaj bezonoj. Jen ili:

Oni reaperigis la polan-esperantan vortaron de M. Guterman.

Oni krompresis (per malnovaj matricoj) la epitomon „Esperanto-konversacioj” de A. Pettyn, kiun ĉefe aĉetis „Ars Polona”.

Oni finaligis la eldonon de nova vortaro pola-esperanta (eldonaĵo de „Wiedza Powszechna”), kies aŭtoro estas K. Tymiński.

Oni venigis hungarajn Esperanto-eldonaĵojn (ĉefe por la instruistoj), ia. pere de la Instituto de la Hungara Kulturo en Varsovio.

Ni kunagis ĉe la aperigo de la esperanta faldfolio „Koszalin” kaj ĉe la aperigo de la esperanta faldfolio „Międzygórze”.

Ni iniciatis baldaŭan aperigon de novaj esperantaj konversacioj por la eksterlandaj turistoj (ili aperos plej verŝajne en la dua duono de la 1971 jaro, fare de „Wiedza Powszechna”).

Ni establis redaktan komitaton de la polaj nocioj en la Esperanta Enciklopedio — kunlabore kun Jan Zawada kaj ni entreprenis laborojn ligitajn kun aperigo de enciklopedio de la pola esperantista movado.

Ni establis la centran arkivon de la historio de la pola esperantista movado ĉe la Ĉefa Estraro de PEA (gvidas ĝin Jan Zawada).

Ni antaŭvidas baldaŭan aperigon de la lernolibro de A. Pettyn: „Praktika kurso” kaj krompreson de la esperanta-pola vortaro de T. J. Michalski.

Konsciante pri la nesufiĉaĵoj en la sfero de la esperantaj tradukoj de la pola beletro, ni klopodas pri reeldono de klasikaj verkoj de polaj verkistoj (Mickiewicz, Sienkiewicz, Prus, Tuwim).

Ni klopodas pri aperigo de aktualaj soci-politikaj eldonaĵoj parolantaj pri la atingoj de nia lando, kaj ankaŭ de turisma gvidlibro tra Pollando, de „Auschwitz-Oratorio” de A. Nowak kaj de verkoj okaze de la solenado de la naskiĝa datreveno de Mikołaj Kopernik.

Aparte grava afero estas la nuna regula aperado de nia presorgano — „Pola Esperantisto”, al kio ni finfine alkondukis. Ĝi nun aperas jam regule. Nun ni, kiel redakcia komitato, kune kun vi, legantoj, devas pripensi rimedojn por plialtigi la nivelon, pliriĉigi la enhavon de „Pola Esperantisto”.

En la nuna jaro, post preskaŭ kvinjara interrompo, ni aperigos ampleksan, polan numeron de „Paco” — presorgano de la Mondpaca Esperantista Movado.

### JUNULARO

Ni bonege konscias, ke la estonteco de nia asocio troviĝas en la manoj de junaj, plenaj de entuziasmo aktivuloj grupiĝintaj en la sekcio „Pola Esperanto-Junularo”. Jen la kaŭzo de nia plena subteno por ĉiuj prudentaj iniciatoj de nia junularo kaj se eble ĉiufanka helpo, kiun ni donas.

\*

Mi komprenas evidente, ke mi preterlasis ankoraŭ mutajn aferojn iniciatitajn kaj realigitajn same de la Ĉefa Estraro, kiel ankaŭ de la lokaj Filioj kaj de PEJ (i.a. la konferencojn, kunvenojn, seminariojn, kunlaboron kun UEA kaj la financajn aferojn, kiuj kompreneble en decida maniero influas nian agadon, sed kiuj estis kaj estas sisteme sciigataj al la Filioj kaj al la membroj). Ankoraŭfoje akcentante la malfacilaĵojn de nia asocio, mi ne povas rezisti la moderan optimismon se temas pri la estonteco de nia movado. Fakte estas, ke post la okazigo de la malfacila reorganizo de la laboro, surbaze de la nova Statuto, niaj vicoj estos ĉiam pli grandigantaj, la kontaktoj de la asociaj aŭtoritatoj kun la lokaj ĉeneroj de PEA plue intensiĝos, en la vicoj de la membroj kaj aktivuloj venos plena kompreno pri la celoj kaj taskoj de nia asocio, kaj ilia aktiva kunagado kaj krea iniciatemo konfirmos tiun ĉi optimismon.

Mi opinias, ke la skizitaj ĉi tie pensoj kaj problemoj povos esti enkondukita materialo por pripensoj en la tuta organizaĵo kaj servi al la elektotaj delegitoj por la Kunveno kiel materialo por diskuto. Ĉar la Kunveno, kiel la plej alta instanco de nia asocio, ja aprezos kaj determinos definitive la estontajn direktojn kaj perspektivojn evoluajn de nia asocio. Ja temas pri granda afero — pri transformo de nia organizaĵo en amasan movadon, servantan per sia agado al la ideo de la internacia lingvo kiel ponto por interproksimiĝo de la nacioj, kiel instrumento de la batalo por paco, socia justeco, instrumento servanta al la interesoj de nia socialisma patrujo.

Kredeble ne estos tro frua malkaŝo de sekreto, ke ni havas la intencon organizi en la 1974 jaro Universalan Kongreson de Esperanto en Vroclavo, sur la polaj okcidentaj teritorioj, en la 30 datreveno de la kreiĝo de Pola Popola Respubliko. Tiel do dependos de la estontaj aŭtoritatoj de PEA kaj de la tuta asocio, jam kiel amasa organizaĵo, ĉu ni ricevos konsenton de la kompetentaj aŭtoritatoj organizi tiun ĉi kongreson, sed ankaŭ dependos — ĉu tiu ĉi kongreso estos aŭtentika, nova kontribuo al la realigado de la nunaj taskoj de la Pola Esperanto-Asocio, taskoj realigataj en la atmosfero de optima aktivado en la servo de la esperantista ideo.

LECH KOSIENIAK

MIĘDZYDROJE. De la 22 ĝis la 29 de junio 1971, en la pitoreska apudmara ripozloko Międzydroje en la norda Pollando, okazos Ferialdo Esperantista, en kies kadro oni ankaŭ gvidos E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Informojn oni petu ĉe: Turisma Koope-

rativo „Gromada”, Szczecin, Pl. Lotników 7, Pollando.

LUBOSTRŃ. De la 4 ĝis la 17 de majo 1971 en la belega ripozloko LubostrŃ (en la vojevodio de Bydgoszcz) okazos dusemajna E-Ferialdo. La feriojn aranĝas la Vojevodio

Estraro de PEA en Bydgoszcz kune kun la Ferialdo de la Polaj Sindikatoj. En la kadro de la programo oni antaŭvidas E-kursojn, prelegojn, ekskursojn kaj kulturajn aranĝojn. Informojn petu ĉe: Pola Esperanto-Asocio, Bydgoszcz, Pomorska 23 1.5. Pollando.

# La Kastelo

daŭrigo de la p. 1

dum preskaŭ jarcento kaj duono estis senigita je la sendependeco. Eĉ pli — oni faris multegon por forigi la nomon de Pollando por ĉiam de sur la eŭropa scenejo.

Kaj aliflanke — ekzistas tre malmultaj lokoj en nia lando, en kiuj okazis tiom multaj vivgravaj eventoj, kiel ĝuste en la varsovia Reĝa Kastelo. Nur Vavelo en Krakovo povas esti ĉi-rilate pli fiera. Sed ĝi apartenas al pli fora pasinteco. Kaj en la Varsovia Kastelo okazis eventoj, kies signifo, kaj eĉ influo restas en la konscio de nia nacio ĝis hodiaŭ. Ne tiom gravas por la nunaj generacioj, ke en la XVII jarcento okazis la lasta omaĝo al la pola reĝo fare de la prusa elekto-princo Frederiko Vilhelmo. Ne tiom gravas ĉi tiuj faktoj, ĉar ili apartenas al la fora historio. Sed tamen ili rememorigas la brilan pasintecon. En la kastelo, jam en la XVII jarcento, kiam Varsovio definitive fariĝis la ĉefurbo de Pollando dank' al reĝo Zigmundo la III Vazo, kies figuro leviĝas ankaŭ hodiaŭ sur kolono meze de la Kastela Placo, en la kastelo koncentriĝis la tuta ŝtata vivo de la malnova I Respubliko. En ĝi kunsidis la nobelaj parlamentoj — sejmoj, en ĝi estis la senataj kunsidoj, en ĝi la reĝo akceptadis diplomaciajn senditojn el la

tuta mondo. Ĉio ĉi levas la historian rangon de la varsovia Kastelo.

Sed eble plej forte firmiĝis en la konscio de la nunaj poloj la fakto, ke en la Varsovia Kastelo dum la regado de la lasta reĝo, Stanislavo Aŭgusto Poniatowski, naskiĝis, maturiĝis kaj realiĝis ideoj kaj institucioj, kiuj levis Pollandon ĝis la nivelo de la plej progresema lando en la sfero de la edukado kaj kulturo. Ja en la kastelo oni preparis kaj fondis la Kavalaran Lernejon, kiu celis eduki alte instruitajn civitanajn agantojn, kies studanto-kadeto estis inter multaj aliaj famuloj ankaŭ Tadeusz Kościuszko, la nacia heroo de Pollando kaj Usono. En la varsovia Kastelo estis fondita kaj funkciis tie la unua en la mondo ministerio por la klerigo — nome Komisiono por la Nacia Edukado. Ankaŭ en la kastelo laboris la unua konstanta registaro de Pollando — Konstanta Konsilantaro. Kaj fine — en la kastelo estis proklamita kaj akceptita de reĝo Stanislavo Aŭgusto la Konstitucio de la Tria de Majo en la 1791 jaro — la plej progresema konstitucio de la mondo en la tiam tempo.

La bonaj planoj kaj intencoj ne realiĝis pro aliaj pekoj kaj malfortoj de la nobela respubliko. Pollando

Estraro de  
POLA ESPERANTO-ASOCIO  
ul. Jasna 6  
WARSZAWA 1

Kopie al la  
Esperanto-Redakcio de la Pola Radio

*Estimataj samideanoj,  
dum la lastaj semajnoj mi aŭdis en la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio pri la plano kaj decido rekonstrui la Reĝan Kastelon en Varsovio. Kun intereso mi aŭdis ankaŭ pri la kampanjo popularigi kaj subteni la rekonstruon, en kiu partoprenas ankaŭ la Pola Esperanto-Asocio.*

*Ŝajnas al mi, ke en rekonstruo de la Reĝa Kastelo partoprenu ankaŭ eksterlandaj esperantistoj, kaj speciale la aŭskultantoj de la Esperanto-Programoj de la POLA RADIO, por manifesti la internacian solidarecon kaj por montri la efikecon de la Esperanto-elsendoj.*

*Por mi, kiu nur antaŭ kelkaj monatoj havis la okazon vidi Varsovion, estas do agrabla tasko kontribui al la fonduso por rekonstruo de la Reĝa Kastelo.*

*Ĉi-kune bonvolu trovi ĉekon pri GM 50,—. Mi petas vin transdoni ĉi tiun ĉekon al la kompetanta instanco en Varsovio kun miaj sinceraj bondeziroj.*

*Samtempe mi sendas al vi en du sendaĵoj librojn je 75,50 GM. Mi petas vin, la kontraŭvaloron por*

*tiuj ĉi libroj kaj revuoj, post vendo, ankaŭ transdoni al la fonduso por rekonstruo de la Reĝa Kastelo. Kun multaj deziroj por sukcesa rekonstruo de la kastelo,*

*mi salutas vin sincere via  
(—) LUDWIK PICKEL*

## REKONSTRUO DE LA REĜA KASTELO EN VARSOVIO

*Varsovio. Estas farita decido pri rekonstruo de la Reĝa Kastelo de Varsovio, kiu estis detruita de la germanoj dum la milito. En la tuta Pollando estas starigita kampanjo popularigi tiun ĉi decidon kaj subteni la rekonstruon. Ankaŭ Pola Esperanto-Asocio partoprenas en tiu ĉi kampanjo kaj okazigas monkkolektadon por tiu ĉi celo. Jam kelfkfoje la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio raportis pri la rekonstrua plano kaj la kampanjo.*

*Kial ni, amikoj de Pollando en la tuta mondo, kaj speciale la aŭskultantoj de la Esperanto-Programo de la POLA RADIO, ne partoprenu en la kampanjo, por subteni rekonstruon de la Reĝa Kastelo de Varsovio?*

*La redakcio de PILO-PRESS alvokas al ĉiuj esperantistoj en la okcidentaj landoj partopreni en la monkkolektada kampanjo kaj sendi donacojn por la rekonstrua fonduso per la adreso de POLA ESPERANTO-ASOCIO, ul. Jasna 6, Warszawa 1, Pollando. PILO-PRESS ankaŭ estas preta peri la donacojn.*

(PILO-PRESS Nr 8/1971 21 feb. 71)



# de nia fiero

estis dispartigita, malliberigita. Sed ankaŭ en tiu ĉi historia punkto la varsovia Kastelo, kvankam uzata de la okupaciaj regantoj, estis plurfoje atestanto de grandaj eventoj. Ekzemple, kiam dum la novembro kontraŭcara insurekcio en la 1831 jaro la sejmio abolis de sur la pola trono la dinastion de la rusaj caroj.

Post la reveno al la sendependeco en la 1918 jaro la kastelo estis restaŭrita post la detruoj fare de la okupaciintoj kaj dum la unua mondmilito. Ekde la 1927 jaro ĝi estis sidejo de la prezidentoj de Pola Respubliko.

Tiel, en granda mallongigo, aspektas la ligiteco de tiu ĉi konstruaĵo kun la pola historio. Ĝi simbolas plej adekvate tiun ĉi historion. Kaj ke tio ĉi estas objektiva fakto, kaj ne nur la pola sentimentalismo, pravas la sinteno de la hitleranoj, kiuj tuj post la ekregado de Varsovio decidis ruinigi la kastelon.

La varsovia Kastelo estis do la simbolo de la kontinueco de la pola historio, de la pola progresema ŝtata kaj civitana penso. Kaj la nuna decido rekonstrui la kastelon emfazas la ligitecon de Popola Pollando kun tiu ĉi tradicio. Tial la tuta lando, ĉiuj



poloj, ankaŭ la dissemigitaj multnombre tra la mondo, volas kontribui al revenigo de la varsovia Reĝa Kastelo al la iama gloro. Ankaŭ la polaj esperantistoj kaj alilandaj aliĝis al la kampanjo.

JERZY USPIEŃSKI

## LA KASTELO DE NIA FIERO

S-ino Ada Fighiera-Sikorska el Bruselo, ĉefredaktoro de la plej granda revuo en Esperanto — „Heroldo de Esperanto”, abonata de legantoj en 66 landoj, sian eldiron por ni prezentis, memkompreneble, en la pola lingvo:

„La sciigon pri rekonstruo de la Reĝa Kastelo alportis al mi la radio, kaj krome en la Esperanto-elsendaĵo. Mi treege ĝojas kaj mi estas fiera, ke nia lando, plue estas fidela al kulturo. Mi pensas, ke ĉiu polo, kie ajn li vivas en la mondo, devas esti fiera pri tiu ĉi decido kaj doni briketon por la fondaĵo de rekonstruo de la kastelo”.

## KOMUNIKO DE LA CIVITANA KOMITATO POR REKONSTRUO DE LA REĜA KASTELO

**Pri ĉiuj aferoj ligitaj kun rekonstruo de la kastelo, kaj ankaŭ kun proponoj pri sociaj laboroj kaj memvolaj kotizoj por la rekonstrua fondaĵo — oni devas kontaktiĝi kun la oficejo de la komitato je la suba adreso kaj telefonnumero, ĉiutage inter la horoj 9—17.**

**La korespondadojn oni devas direkti al la adreso:  
OBYWATELSKI KOMITET ODBUDOWY ZAMKU  
KRÓLEWSKIEGO  
WARSZAWA  
PLAC ZAMKOWY 10  
POLLANDO**

**La konto:  
I ODDZIAŁ MIEJSKI PKO  
WARSZAWA — NR 1-9-122122**

**La konto por enpagoj el eksterlando:  
ODBUDOWA ZAMKU KRÓLEWSKIEGO  
W WARSZAWIE  
Konto: E-100700 en Banko PEKAO**

## UEA kandidatigita por la Pacpremio de Nobel

La Universala Esperanto-Asocio estis ĵus kandidatigita por la Pacpremio de Nobel. La propono por la Universala Esperanto-Asocio havas multpartian bazon. Apud 132 svedaj parlamentanoj troviĝas 14 membroj de la dana parlamento; same el ĉiuj partioj kaj grupoj de parlamentanoj kaj aliaj kvalifikitaj personoj el Francujo, Italujo, Britujo, Norvegujo, Usono, Nederlando (37 parlamentanoj el kvin partioj)

kaj aliaj landoj. La proponoj parolas pri la jam granda disvastigiteco de la Internacia Lingvo, pri la neceso de komuna komprenilo kiel antaŭkondiĉo por paca evoluo de la internaciaj rilatoj kaj pri la bonfara laboro de la Universala Esperanto-Asocio ne nur dum la mondaj militoj, sed ankaŭ en tempoj de paco — por krei amikajn rilatojn inter la popoloj.

## EN LA MONDO

### ESPERANTO EN SOVETUNIO

Solenaĵoj omaĝe al la kreinto de Esperanto — d-ro Ludoviko Zamenhof okazis ankaŭ en Sovetunio. Aparte imponaj solenaĵoj estis organizitaj en Moskvo kaj Rigo. En Moskvo prelegon pri Zamenhof prezentis d-ro E. T. Salmikov kaj docento B. V. Tokarev, en Rigo — la konata Esperanto-poetino, Ludmila Jevsjejeva. Eminentaj Esperanto-poetino en Latvo estas ankaŭ Elvira Lippe. Ambaŭ solenaĵoj estis akompanitaj de koncertoj.

LENINGRADO (Sovetunio). Informis docento Vasiliĵ Bascv. La Leningrada Esperanto-Klubo aranĝis, la 21 de februaro, solenan vesperon honore al sia prezidanto, samideano Podkaminer, kiu festis la 70 naskiĝdatrevenon kaj la jubileon de la jarkvindeko de la poresperanta agado.

NÜRNBERG (Germana Federacia Respubliko). La 17 de februaro 1971 en Herford okazis podia diskuto pri la temo: „Esperanto — la vojo al paco”. Por la diskuto invitis 200 afiŝoj en la urbo. La 6 kaj 7 de marto, en la hotelo „Reuter” en Möhnese-Günne, okazis faka instruista kunveno de AGEI. (PILO PRESS).

### MEMUARO DE ESPERANTISTOJ EN GFR

La Germana Asocio de la Instruistoj-Esperantistoj, aganta en GFR, transdonis al la konstanta konferenco de la kulturministroj de la landoj de GFR memuaron pri la afero de instruado de Esperanto. La aŭtoroj de la memuaro prezentis en ĝi konkretajn proponojn.

Tiu ĉi dokumento estis aperigita presforme en la nombro de 6 mil ekzempleroj kaj dissendita al la kompetentaj instancoj kaj al multaj intelektuloj de GFR.

### ESPERANTO INTER LA AFRIKA JUNULARO

Jam al 12 landoj de la mondo atingis la agado de la Afrika Komisiono de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La presorgano de la komisiono estas la monatrevo „Esperanto en Afriko”, kies redakcio troviĝas en Malgaŝa Respubliko; la revuon oni presas en Senegal.

### ESPERANTA LITERATURA REVUO

En Italujo komencis aperadi nova literatura revuo en Esperanto sub la titolo „Literatura Foiro”. Tiu ĉi revuo estas organo de la itala esperantista literatura klubo „La Patrolo”. La revuo aperigas ĉefe beletron. Inter la aŭtoroj kontribuantaj al la enhavo de la revuo troviĝis ĉefaj italaj Esperanto-verkantoj.

### ESPERANTO EN LITOVAJ LERNEJOJ

En la loko Ŝalciniukaj okazis seminario por instruistoj — edukantoj de junularo en internulejaj lernejoj.

Dum la seminario, lerneja esperantista rondo „Revo” prezentis sukcesojn de sia internaciisma edukado helpe de Esperanto. En lerneja ekspozicio troviĝis gazeteltondaĵoj pri la agado de la rondo, inter aliaj el la pola ĵurnalo „Ilustrowany Kurier Polski”, apud multaj ekspoziciaj atestantoj pri la intima kontakto de la junaj esperantistoj el la rondo „Revo” kun esperantistoj el la Oriento kaj Okcidento.

La seminarianoj partoprenis renkontiĝon de esperantista aktivularo organizitan okaze de la naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof. Estis prezentita teatraĵo pri Esperanto-temoj.

La rondo „Revo” vizitis antaŭ nelonge novan lernejan esperantistan klubon „Skarlataj Ondoj” en Vilnjus.

### „SINJORO TADEO” EL ESPERANTO EN LA MONGOLAN

La konata tradukisto de la rusa kaj soveta, pola, ĉeĥa kaj slovaka literaturo en la mongolan lingvon, kaj samtempe eminenta konanto de la internacia lingvo — prof. B. Rinĉen, kiu antaŭ nelonge gastis en Varsovio kaj partoprenis la II Internacian Kongreson de Tradukistoj de la Pola Literaturo, konstatis:

„Esperanto — mia opinio — ludas kaj ludos ĉiam pli grandan rolon en la tradukado de literaturaj verkoj en la aziajn lingvojn. Mi mem tradukis el Esperanto en la mongolan interalie „Fabelojn” de Andersen. Post finiĝo de laboro super la tradukado de „Sinjoro Tadeo”, en kio tre helpa estas al mi la esperanta traduko de tiu ĉi verko, mi strebos havigi al la mongola leganto pere de Esperanto ankaŭ aliajn verkojn de la pola literaturo, eldonitajn en la internacia lingvo.”


La eldiro de prof. Rinĉen montras, ke la pola literaturo trovis en Esperanto bonegan ambasadoron.

## EN POLLANDO

Okaze de la jubileo de 50 jaroj de la cferema kaj aktiva agado sur la kampo de Esperanto kaj pro meritoj por la evoluo de la esperantista movado, la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio, laŭ la decido el la 10 de decembro 1970, donis al red. Kazimierz Małycha la titolon: **Honora Membro de la Pola Esperanto-Asocio.**

Laŭ la propono de la Komisiono por la Insigno ĉe la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio — laŭ la decido de la Prezidumo de la Ĉefa Estraro de PEA el la 10 de decembro 1970, oni aljuĝis al s-ano Józef Bieliński el Bydgoszcz la honoran insignon de „Meritplena Esperantisto”.

KRAKOVO. En Krakovo estas fondita Krakova Konsilantaro de la Soci-Kulturaj Societoj, kies tasko estas kunordigi la kultur-klerigan agadon de la tuta krakova regiono. La Konsilantaro arigas tri grupojn de la societoj, nome: societojn de amikeco (inter kiuj troviĝas ankaŭ Pola Esperanto-Asocio), artajn societojn kaj histori-sciencajn societojn. La prezidanto de la societoj de amikeco kaj samtempe vicprezidanto de la Konsilantaro estas elektita s-ano MARIAN KOSTECKI — la vicprezidanto de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio.



S-anino Stefania Palica, la prezidantino de la Filio de la Pola Esperanto-Asocio en Szczecin, kaj instruistino de Esperanto en la Junulara Palaco de Szczecin — ricevis premion okaze de la Tago de la Instruisto.

Premion okaze de la Tago de la Instruisto ricevis ankaŭ instruistino de Esperanto en la Ekonomia Teknikumo en Szczecin, s-anino Janina Czeraszewicz.

## LA PLEJ MALJUNA ESPERANTISTO

La populara skolta gazeto „Świat Młodych” (La Mondo de la Junaj) publikigis en la numero el la 15 de decembro 1970 rememorojn de la plej maljuna pola esperantisto — Stanisław Rudnicki, sub la titolo: „Esperanto signifas esperon”. La veterano de la esperantista movado, malgraŭ la patriarka aĝo (li kalkulas 94 jarojn), plue agas aktive en PEA. Stanisław Rudnicki estis partoprenanto de la IV Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono (1908 j.) kaj unu el la organizintoj de la VIII Universala Kongreso en Krakovo antaŭ 58 jaroj. Li persone konis dron Zamenhof.

GDANSKO. Lige kun la Semajno de Internacia Amikeco sabate, la 27 de februaro 1971, en la klubejo de la Societo por la Pola-Soveta Amikeco en Gdansk okazis „Amikeca Vespero”. Dimanĉe posttagmeze, en la Elementa Lernejo numero 8 en Sopot renkontiĝis junaj esperantistoj de la Triurbo kaj regiono.

## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO EN SZCZECIN

Organizon de la Semajno de Internacia Amikeco la Estraro de la Filio konfidis al la esperantista junularo en Szczecin. La 25 de februaro 1971 kvar vietnamaj studentoj lernantaj en la Politekniko de Szczecin vizitis la Esperanto-kabineton en la Palaco de Junularo.

En agrabla atmosfero, la junaj partoprenantoj el Demokratia Respubliko de Vjetnamo kaj Pollando amikiĝis reciproke, kaj ĉiuj ĉeestantoj sendis salutojn al siaj amikoj sur poŝtkartoj preparitaj de la filia Estraro, kiu prenis patronecon super la renkontiĝo.

La loka gazetaro kaj radiostacio de la Pola Radio antaŭanoncis la Semajnon de Internacia Amikeco kaj la menciitan renkontiĝon.

(S.P.)

## INSTRUISTA KUNVENO

Dimanĉe, la 13 de decembro 1971, Toruń gastigis Vojevodian Kunvenon de Esperanto-Instruistoj. Oni preparolis la staton de la preparoj al la I Tutlanda Konferenco de la Esperanto-Instruistoj, kunvokita por la 13 kaj 14 de aprilo 1971 en Bydgoszcz. Oni diskutis ankaŭ pri la situacio en la sfero de la instruado de Esperanto en la vojevodio de Bydgoszcz. Sole en Bydgoszcz kaj Toruń oni gvidas pli ol 30 kursojn kaj lektoratojn de la internacia lingvo. Ankaŭ en malpli grandaj centroj oni observas kreskantan interesigon pri Esperanto. La malfacilaĵo estas tamen nesufiĉa nombro da kvalifikitaj lekciantoj.

## EN KRAKOVO

La 13 de decembro 1971 solenis la krakova esperantistaro la 111 naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof. La solenaĵo okazis en la bele aranĝita Granizona Oficira Klubejo. Post la salutparoladeto kaj enkondukaj vortoj de s-ano Alojzy Turek, kiu gvidis la tutan programon, sekvis tre interesa porokaza referato de s-ano Franciszek Skalniak. Poste la koruso „Orion”, aganta ĉe la Prezidumo de la Kvartala Nacia Konsilantaro Zwierzyniec, kantis la esperantistan himnon kaj kelkajn aliajn esperantlingvajn kantojn kaj prezentis specon de recita spektaklo (en la pola lingvo) laŭ rakonto de Kazimierz Przerwa-Tetmajer, kun la muziko de Bolesław Wallek-Walewski s.t.: „Kiel Joĉjo Bronzulo ne povis trovi feliĉon”. La ĉeestantoj havis la plezuron spekti la kortuŝan folkloran programon kun kanzonoj kaj violonludo. Kiel rakontanto bonege rolis s-ino Józefa Bojko. Ni menciis, ke la koruso „Orion” estas en 1/5 esperantigita, frontloke kun sia direktoro, s-ano Leopold Brichta kaj jam tradicie kantas dum esperantistaj solenaĵoj. La sekva programero estis unupersona spektaklo de Finn Methling s.t.: „La vojaĝo al verdaj ombroj”, en kiu s-ino Jadwiga Gibczyńska (profesia aktorino) prezentis en tre bona Esperanto la homan vivovojon. Pli precize — tiun de la virino, ekde ŝia suĉinfana aĝo ĝis la lastaj tagoj — kun ĉiuj homaj ĝojoj, zorgoj kaj ĉagrenoj. Dank’ al la talenta, esprimplena rolado de s-ino Gibczyńska, ni ĉiuj sidis dum la spektaklo kiel ensorĉitaj. Nur post kiam la spektaklo estis finita, ektondris forta, longdaŭra aplaŭdado.

La lasta programero estis pollingva, amuza versaĵo de la krakova esperantistino Maria Hessel s.t.: „La konfidenca letero”. La solenaĵon ĉeestis pli ol 150 personoj.



VARSOVIANOJ EN MIĘDZYGÓRZE

Kvankam pasis jam preskaŭ unu jaro, sed rememoroj pri la VI Internacia Esperantista Feriado en Międzygórze ĉiam estas freŝaj. Jam pli frue en la revuo „Hungara Fervojista Mondo” mi skribis pri la plej interesa aranĝo — internacia arta vespero. Estas tre agrable por ni ĉiuj anonci la elpaŝon de varsoviaj esperantistoj, kiuj sukcese prezentis tiam sian valoran programon.

Sinjorino Pelagia Sadomska recitis belajn strofojn de la poemo „Mia testamento” de Juliusz Słowacki, kaj sinjoro Stefan Bentkowski rakontis humure pri miskomprenoj pro manko de lingvokono.

En muzika parto de la vespero kantis „Internacia Trio”: polino el Varsovio — Elżbieta Jodłowska, rumano — Stefan Tudor kaj litvano — Algis Vizigirdas. Tiu ĉi ensemblo prezentis vere belajn esperantajn kanzonojn kaj meritis grandan aplaŭdon.

Ni tre ĝojas, ke varsoviaj gesamideanoj aktive kontribuis al pliagrabligo de la konata internacia renkonto en Międzygórze.

Sur la foto — la Internacia Trio prezentas sian programon. De dekstre: Algis, Elinjo kaj Stefan.

Jadwiga Wicińska

## ESPERANTAJ NOVAĴOJ

De kvar jaroj funkcias lektorato de Esperanto en la Instruista Studumo en Grodzisk Mazowiecki (varsovia vojevodio). La lektoroj estas mag. Józef Dąbrowski kaj mag. Eugenia Szczyglińska. Por la diplomitoj de la lektorato estas aranĝataj ŝtataj ekzamenoj. Sukcesa ekzameniĝo rajtigas instrui Esperanton.

## ORGANIZAJ AFEROJ – VOJEVODIAJ FILIOJ

Laŭ la decido de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperano-Asocio, ekde 1.I.1971 estas kreitaj 8 Vojevodiaj Filioj de PEA, nome: en Bydgoszcz, Gdańsk, Katowice kun sidejo en Gliwice, en Krakovo, Łódź, Poznań, Varsovio kaj Vroclavo. Ĉiu el la vojevodiaj filioj en Krakovo, Łódź, Poznań, Varsovio kaj Vroclavo agas sur la teritorio de la vojevodio, samkiel sur la teritorio de la koncerna elapartigita urbo. En la aliaj vojevodioj estos laŭbezzone kreaĵaj organizaj komitatoj, kiuj preparos grundon por establi la vojevodiajn filiojn.

La ĉefaj taskoj de la vojevodiaj filioj de PEA estas organizi kaj gvidi la esperantistan movadon sur la teritorioj de koncerna vojevodioj. Tial do kun ĉiuj organizaj aferoj, pri kiuj lastatempe kompetentas la vojevodia filio, oni devas sin turni al la koncerna instanco. Rilate al la teritorioj de supre nenomita vojevodioj, ĉiujn organizajn aferojn anstataŭ la vojevodiaj filioj, pritraktas la Ĉefa Estraro de PEA.

En la unua jarkvarono en nia Asocio okazos vojevodiaj kunvenoj, dum kiuj oni pritraktos planojn de la agado por la nuna jaro, elektos novajn estrarojn de la vojevodiaj filioj (kie finiĝis la oficperiodo de la koncerna estraro) kaj elektos la delegitojn por la nunjara landa kunveno de la delegitoj de PEA, kiu okazos jarfine.

Jen ni prezentas du estrarojn de vojevodiaj filioj, kiuj jam agas de kelka tempo:

1) Estraro de la Vojevodia Filio en Łódź, elektita ankoraŭ en la 1970 jaro:

Prezidanto — Helena Bolanowska, viceprezidanto — Stanisław Małek, sekretario — Daniela Matray, kasisto — Jadwiga Hempel, membroj — Zofia Kłopocka, Irena Jędrzejczak, Krystyna Kubik.

La adreso de la Vojevodia Filio estas: Łódzki Dom Kultury, ul. Traugutta 18; poŝta adreso: Łódź 1, skr. poczt. 337.

2) En januaro 1971 estis elektita nova estraro de la Vojevodia Filio en Katowice kun sidejo en Gliwice: Prezidanto — Jan Karłowski, vicprezidanto — Ewa Szajner, sekretario — Jerzy Wolf, kasisto — Józef Szczepanowski, membroj — Rajmund Czok, Piotr Kołodziej, Maria Kraus, Witold Mazur, Regina Rokicka, Janina Veltze, Józef Żytyński.

La adreso de la Vojevodia Filio estas: Gliwice, Rynek 2.

En la sekva numero de „Pola Esperantisto” ni aperigos liston de la sekvaj estraroj de vojevodiaj filioj, kaj ankaŭ liston de delegitoj por la landa kunveno de delegitoj.

Jerzy Mażys

### LA VI VINTROSEMajNO DE LA POLA ESPERANTO — JUNULARO

Ĉi-foje Białowieża estis renkontiĝloko de ĉirkaŭ 50 PEJ-anoj el sep urboj, nome: Bjalistoko, Bydgoszcz, Gdansk, Krakovo, Lublino, Toruno kaj Varsovio. Partoprenis ankaŭ grupo de bulgaraj esperantistoj; jam la duan fojon ĝi venis al Pollando por partopreni en la vintrosemajno. La organizon prizorgis Walentyna Fiszer kaj Krzysztof Żmijewski, la programon prilaboris Stanisław Świstak, kiu gvidis ankaŭ Esperanto-konversaciojn, el kiuj multan profiton tiris ne nur la komencantaj esperantistoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj supozis koni la lingvon bone, sed ne scipovis eligi el lingvaj embuskoj sprite preparitaj de li.

Estis ankaŭ instruataj novaj Esperanto-kanzonoj, pri kies neelĉerpebla riĉego disponis Ewa Radecka.

La programo, krom la distraj partoj, enhavis ankaŭ iom da seriozaj kaj sciencaj, al kiuj certe povas aperteni: prelegoj pri la tutmonda Esperanto-Movado, TEJO — la organiza strukturo kaj agadformoj.

Kiel kutime, okazis granda Junulara Esperanto-Balo, dum kiu ni salutis per ĉampano la Novan Jaron.


La unuan vesperon de la jaro 1971 ni pasigis sledvojaĝante tra praarbaro, kie ni ĉe fajrujo manĝis bongustan „bigoson” (kuiritan brasikon kun kolbaso) por reakiri la fortojn perditajn dum la Silvestra Balo.

La lastan tagon debatis Plen-Komitato de PEJ; en la debatoj partoprenis multaj gejunuloj, ankaŭ tiuj ne havantaj la rajton voĉdoni. Poste la organizintoj solene anoncis fermon de la VI vintrosemajno kaj invitis nin partopreni en la VII. Do, ni sekvu la proponon!

La 14 de aprilo pasas la 54 datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof. Lia tombo troviĝas, kiel sciata, en Varsovio. (La foto, de s-ano K. Miezyn, ricevebla ĉe PEA)



WESOLYCH  
SWIAT




La malnova pola kutimo postulas la duan tagon de la Paskaj Festoj surverŝi la damon de sia koro se eble plej abunde

# *La pola*



*prin-*

*tempo*



Al ĉiuj niaj karaj Legantinoj, Simpatiantinoj kaj Kunlaborantinoj ni deziras ĉion plej bonan en Ilia privata vivo kaj plujajn sukcesojn en Ilia esperantista agado

### Esperanto — Vortarino

*indiko* — virina svelteco  
*inaŭguri* — antaŭvidi naskon de infanino  
*indigno* — virina respekto pleno  
*induko* — virina princo  
*infesti* — soleni la Internacian Tagon de la Virinoj  
*infiltiri* — ekzameni kandidatinon por sekretariistino  
*infinito* — eluzita, pensita edzo  
*informi* — krei edzinon por Adamo  
*ingesto* — virina parolhelpilo  
*inhalo* — haremo  
*intesto* — fianĉina ekzameno  
*intima* — teruranta virincjn  
*invalida* — taŭga kiel edzo  
*inverso* — kie diablo agi ne povas, tien virinon li ŝovas  
*inverto* — kaposupro de niaj karulinoj  
*invoki* — laŭvoĉe alvenigi akompanontinon

R. R.

## Esperanta Teatro

### Interparolo kun la estro de la Teatro

Zbigniew Dobrzyński

En la lastaj jardekoj la internacia lingvo penetras pli kaj pli multajn sferojn de la homa aktivado; ĝi fariĝas ĉiam pli vastskale uzata en la scienco, tekniko, literaturo, kulturo kaj arto.

Certe nebagatelajn atingajojn en la lasta sfero povas noti la pola esperantista movado. La komenco, kiun faris „Teatr Powszechny” („Populara Teatro”) el Lodzo per sia „Kataki — signifas malamiko”, montriĝis bona komenco. Sekvis la unuaktoraj spektakloj de Karina Waškiewicz kaj Jadwiga Gibczyńska. En la lasta tempo du nomoj famiĝis: tiuj de Danuta Alczewska-Klus kaj Andrzej Tomecki. La internacia lingvo familiariĝas do en la pola artista medio. La suba intervjuo montras, ke tiu ĉi familiariĝo povas noti plian sukceson, nome establiĝon de Esperanta Teatro ĉe la Pola Esperanto-Asocio.

**DEMANDO:** Sinjoro, kiel naskiĝis la ideo de Esperanta Teatro?

**RESPONDO:** Vi estos surprizita, se mi diros, ke tiu ĉi ideo naskiĝis jam antaŭ kelkaj jaroj, en la tempo, kiam Lucjan Wiernek frontloke de la malgranda teatra kolektivo forveturis el Lodzo al Tokio por spektakli antaŭ la kongresa publiko. Por mi, profesia aktoro, tio ĉi estis pruvo, ke la internacia lingvo Esperanto plene taŭgas ankaŭ kiel lingvo donanta al la aktoro la eblon ludi en ĝi. Mi estus ankaŭ malsincera, se mi ne dirus, ke mi enviis al la lodzanoj la ekspedicion al la fora Japanujo, ĉiam vekanta scivolegon en Pollando.

**DEMANDO:** Kial do la ideo realiĝis nur nun?

**RESPONDO:** La ŝanco de la lodzanoj estis tio, ke ili aktoris en la sama teatro. La aktoroj estas nun treege okupataj. Ili ludas en sia propra teatro, en la televido, en la radiaj spektakloj. Estas do treege malfacile formi kolektivon por iu teatraĵo, se la ludontoj estas laborantoj de diversaj teatroj. Eĉ se ili jam decidis lerni Esperanton. Kaj ja ne ĉiu kaj ne tuj, eĉ se tentate de fora perspektivo de iuj vojaĝoj, volas investi sian tempon kaj energion por lerni la inter-

nacian lingvon. Iom senfervoriĝinte en tiu tempo, mi tamen ne rezignis pri mia ideo, kredante, ke mi sukcesos iam efektiviĝi ĝin. Ĝuste la sukcesoj de polaj aktoroj kaj artistoj en la lastaj jaroj kredeble kuraĝigis miajn nunajn kolegojn el la Esperanta Teatro „riski” kaj fariĝi esperantistoj.

**DEMANDO:** Kio do estis necesa, por ke via ideo efektiviĝu?

**RESPONDO:** Mi premisis, unue, ke — kvankam sukcesaj, aŭ foje eĉ tre sukcesaj — individuaj provoj aktoraj okazigi spektaklojn en Esperanto — signifas tamen la komencan etapon en tiu ĉi sfero. Daŭrigante la rezonadon, mi do venis al la konkludo, ke necesas iu organiza formo de la fenomeno „teatro en la internacia lingvo”. Tial — kiel vi scias — mi turnis min al la Ĉefa Estraro de PEA kun la propono establi teatron, kiu prezentadus en la internacia lingvo kaj filligi ĝin ĉe PEA. Antaŭ ol povi proponi ĉi tion, mi estis devinta certigi la Ĉefan Estraron de PEA, ke du kondiĉoj estas plenumitaj: ke ekzistas iu aktora kolektivo konanta Esperanton kaj ke al ĝi apartenas esperanta literaturisto.

**DEMANDO:** Kaj vi sukcesis?

**RESPONDO:** Jes. Jam estas triopo da profesiaj aktoroj, kune kun mi, formanta la Esperantan Teatron ĉe la Pola Esperanto-Asocio. Kompreneble, ni premisas, ke kun la fluo de la tempo nia kolektivo estos grandiĝanta. Estus absurde sin limigi al la nuna konsisto. La komenco tamen, laŭnature, devas esti modesta. Mi sukcesis altiri al nia kolektivo ĵurnaliston, tradukiston de plej alta rango, red. Jerzy Grum. En tiu ĉi momento mi jam povis proponi al la Ĉefa Estraro de PEA, ke ĝi donu al ni sian „benon”.

**DEMANDO:** Kiel vi scias, la „beno” estas donita. Venis do la ĝusta momento prezenti al la legantoj la ensemblon. Vi estas ĝia estro, do — „honore al la rango” — bonvolu komenci de vi mem, ne pekante per troa modesteco.

**RESPONDO:** Mi konfesu, ke hazardo volis, ke mi fariĝis aktoro. Antaŭe mi estis... ŝoforo. Mi estas aktoro de post la 1962 jaro (se mi konsideru kiel la komencon daton la momenton, kiam oni enmanigis al mi la diplomon de la Ŝtata Supera Filma kaj Teatra Lernejo en Lodzo). Mi ludis sur pluraj scenejoj en la tuta lando. Nun mi konstante laboras en „Teatr Klasyczny” („Klasika Teatro”) en Varsovio. Mi ludis en pli ol 20 filmoj. Mi menciuj la plej konatajn: „Teŭtonaj kavaliroj”, „Mi havas ĉi tie mian hejmon”, „Divorcoj ne okazos”, „Katastrofo”, „La leĝo kaj la pugno”, „Sorĉistina rokmuro”, „Subtera fronto”, „Lupaj eĥoj”.

**DEMANDO:** Ĉu vi nur aktoras?

**RESPONDO:** Ne. Mia lasta pasio, pardonu — antaŭlasta, estis teatro por junularo. Kune kun du gekolegoj, ni prezentadis (ekster la normalaj okupoj en niaj teatroj) la spektaklon: „Por ke tio ĉi ne plu ripetiĝu”, kies formo povas enspaciĝi kadre de la tiel nomata „teatro de la fakto”. Mi mem skribis ĝian scenaron, mem reĝisoris ĝin, kaj ankaŭ kunludis.

Post ĉiu prezentado (kaj da ili estis jam ĉirkaŭ tricento) ni aranĝadis diskutojn kun junaj rigardintoj. Mi antaŭĝojas pri tiaj diskutoj kun esperantistoj en la lando, sed — kompreneble — unuavice en eksterlando. Kiel vi certe konjektas laŭ la titolo, la spektaklo estas protesto kontraŭ la militoj. Do — temo precipe proksima al la koro de ĉiu esperantisto. Laŭ tio, kion mi ĵus diris, vi certe divenas, ke tiun ĉi spektaklon ni preparas ankaŭ en la esperanta versio. Esperantigas ĝin Andhzej Pettyn.

**DEMANDO:** Antaŭ ol transiri al la repertuaraj planoj, ĉar tiele ekglitis via respondo, ni konatigu ankoraŭ la aliajn teatraĵojn al la legantoj de „Pola Esperantisto”.

**RESPONDO:** Volonte. Mi komencu de la „pli bela duono” de la homa gento.

Sinjinorino KALINA PIENKIEWICZ. Aktorino de post la 1957 jaro — uzante la saman kriterion (la momenton de la finitaj superaj aktoraj studoj). Aktuale aktorino de „Teatr Ziemi Mazowieckiej” („Teatro de la Mazovia Provinco”) en Varsovio. La plej bonaj roloj: Stella en „Tramo nomita — lascivo” de T. Williams, Abigail en „Glaso da akvo” de E. Scribe, Hania en „La stulta Jakobo” de T. Rittner, „La verda pirolo” de T. de Molina — la titola rolo. Sume pli ol 30 roloj. Ŝi ŝatas la bluan koloron, la ciferon „6”, laŭdire ŝia bonŝanca juvelo estas opalo, kion ŝi tamen ne povis ĝis nun konstati (malofte aĉetebla kaj multekosta), la zodiaka signo — pesilo. Ŝi ŝatas kanti, ne plej laste en vodevilaj spektakloj.

Sinjinoro PIOTR FRONCZEWSKI. Aktoro de post la 1968 jaro. Konstante li laboras en „Teatr Współczesny” („Nuntempa Teatro”) en Varsovio. La plej bona rolo: Mortimer en „Maria Stuart” de F. Schiller; en la televido — Sułkowski en „La signoj de libereco” de la pola katolika verkisto R. Brandstaetter. Malgraŭ la relative mallonga aktora staĝo — eksterdube talenta aktoro, kion pruvu interalie tio, ke li estas asistanto ĉe la eminenta pola aktoro kaj samtempe rektoro de la Ŝtata Supera Teatra Lernejo en Varsovio, Tadeusz Łomnicki. Serena, „okulvitrulo”, zeloto de la varsovia futbala teamo „Legia”, ne ŝatas karoton, aliflanke tre — rufharulinojn.

Sinjinoro JERZY GRUM. La literatura estro de la teatro. Prezenti lin al la legantoj de „Pola Esperantisto” signifus malfermi apertitan pardonon. Homo-institucio. Li sorĉas per Esperanto. En la sfero de la literaturo li moviĝas facile, kun talento kaj nuanckompreno. Private — bona por bonaj, saĝa por saĝaj, apertanima por sinceruloj. Sanktulo li certe ne estas. Li ŝatas la vivon en ĉiuj ĝiaj aspektoj — nu, sed ĉio ĉi iel parenteze.

Tiaj ni estas — dume kvar.



**DEMANDO:** Kaj viaj repertuaraj planoj?

**RESPONDO:** Ni planas nian premieron por junio 1971. Temas pri la teatraĵo de nuntempa pola dramverkisto Jerzy Jesionowski — „Por tiuj, kiuj estas supre”. La agado okazas en kosma ŝipo. La sekva spektaklo — „La ĉapo” de Janusz Krasieński. Mi klarigu, ke en la pola malliberula argoto la vorto „ĉapo” signifas la mortopunon. Plie — nia kontraŭmilita spektaklo: „Por ke tio ĉi ne plu ripetiĝu”, pri kiu mi jam parolis. Kaj poste — spektaklo de la „teatro de la fakto”. Kies temo estos la internacia lingvo kaj ties neceso. La teksto de tiu ĉi teatraĵo estos de ni mem skribita.

Ni celas tiel elekti la teatraĵojn, ke ili estu kompreneblaj al la internacia publiko, ke ili traktu aferojn gravajn, per kiuj pulsas la nuntempa mondo. Kompreneble, ni prefere ludos teatraĵojn de polaj aŭtoroj.

Ni volas peri polajn kulturajn havaĵojn al la internacia publiko — en la internacia lingvo. Estas evidente, ke ni esperas, ke per nia agado ni donos nian modestan kontribuon al la afero de kreskigo de la prestiĝo de Esperanto, al la afero de la interŝanĝado de la kulturaj valoroj, al la afero de amikeco de la simplaj homoj en la tuta mondo.

Intervjuis: J.K.

## ĜUSTIGO

Ni korektas la presaron, enŝteliĝintan en la artikolon: „Ni perfektigu la lingvon” en la numero 1/71 de PE (p. 12)

En la linioj 28—29 estas presite:

„Merlo, emo, melo  
Ulmo, remo, vero, revo”

Devas esti:


„Merlo, emo, melo, revo  
Ulmo, remo, vero, mevo”

Ni pardonpetas la Legantojn kaj la Aŭtorinon


(R)

**POLA ESPERANTISTO** — dumonata organo de la Pola Esperanto-Asocio. Adreso de la administracio kaj redakcio: Varsovio, Jasna 6, Polando. Redakcia Komitato: Jerzy Grum, Jan Klimek, Lech Kosieniak, Wiesław Tomaszewski (redaktoro), Jerzy Uśpieński. Teknika redaktoro: Joanna Duchnowska. Abonkosto en la okcidentaj valutoj por la tuta jaro (inkluzive la afrankon) — por Eŭropo, Afriko kaj Azio: 1,60 dol.; por Usono kaj Kanado: 2,20 dol.; por Aŭstralio kaj Nov-Zelando: 0,15.3 ang. p. — aŭ egalvaloro en okcidentaj valutoj. La monon oni sendu al — Warszawa, str. Warecka 10, NBP — XII, O/M NR 1534-6-71 menciante la celon de la enpago. Prezo por unu numero 2 rpk.

**POLA ESPERANTISTO** (Esperantysta Polski) — du-miesięcznik Polskiego Związku Esperantystów; Warszawa, Jasna 6 (tel. 27-82-67). Prenumeratę na kraj przyjmują urzędy pocztowe, listonosze oraz Oddziały i Delegatury „Ruchu”. Można również dokonywać wpłat na konto PKO Nr 1-6-100020 — Centrala Kolportażu Prasy i Wydawnictw „Ruch”, W-wa, Towarowa 28. Prenumeratę przyjmuje się do 15 dnia miesiąca poprzedzającego okres prenumeraty. Cena prenumeraty rocznej — 36.— zł. Prenumeratę na zagranicę, w wysokości 50,40 zł rocznie, przyjmuje Biuro Kolportażu Wydawnictw Zagranicznych „Ruch”, Warszawa, Towarowa 28, tel. 20-46-88, konto PKO Nr 1-6-100024.



# VERDAJ KOKCINELOJ



## Pego



Muziko: Maria Kaczurbina  
Vortoj: Asocio de la Pola Skoltaro  
Esp. trad.: Wiesław Tomaszewski

1. Kiu en arbáro  
Frapas frapu-frap...  
Frapu-frapu-fráp-frap,  
Frapu-frapu-fráp.

Kiu tutan járón  
Batas batu-bát...  
Batu-batu-bát-bát,  
Batu-batu-bát?

Jen sinjoro Pego —  
Pinon prikurace —  
Serças for noculojn  
De sub ŝel' senlace!

Ĝi ja en arbáro  
Frapas frapu-fráp...  
Frapu-frapu-fráp-fráp,  
Frapu-frapu-fráp.

Ĝi ja tutan járón  
Batas batu-bát...  
Batu-batu-bát-bát,  
Batu-batu-bát.

2. Pinoj, kverkoj kréskós —  
Frapu-frapu-fráp...  
Novaj domoj éstos —  
Batu-batu-bát...

Kreskos pinoj, kvérkój —  
Frapu-frapu-fráp...  
Estos novaj méblój —  
Batu-batu-bát...

Ĉar sinjoro Pego —  
Arbojn prikurace —  
Serças for noculojn  
De sub ŝel' senlace!

Arboj sane kréskós —  
Frapu-frapu-fráp...  
Dorĝoj belaj éstós —  
Batu-batu-bát...

Kreskos sanaj arboj —  
Frapu-frapu-fráp...  
Brilos benkoj, táblój —  
Batu-batu-bát...

## VIGLE

Musical score for the song "Pego". The score is written in G major (one flat) and 2/4 time. It consists of three systems of music, each with a vocal line and a piano accompaniment line. The lyrics are written below the vocal line.

System 1:  
 Ki-u en ar-ba-ro frapas frapu-frap: frapu, frapu frap, frap frapu, frapu frap?  
 Ki-u tutan ja-ron batas batu-bat: batu, batu bat, bat, batu, batu

System 2:  
 Jen sinjoro Pe-go pinon pri-ku-ra-ce serças for no-cu-lojn de sub ŝel' sen-la-ce!  
 bat?

System 3:  
 Ĝi ja en ar-ba-ro frapas frapu-frap. frapu, frapu, frap, frap, frapu, frapu frap!  
 Ĝi ja tutan ja-ron batas batu-bat: batu, batu, bat, bat, batu, batu bat!